

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝ
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gill Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
D. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 188
20. 4. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0.06 dolaro
aŭ 0.20 sv. fk. por landoj, kies valuto
suficis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0.06 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Immanuel Kant.

Okaze de l' 200-jara reveno de lia naskiĝtago.

Immanuel Kant,
la granda germana filozofo.

Samtempe kiam oni en Britujo festas la honoron de l' granda angla poeto Lordo George Noel Gordon Byron okaze de la 100-jara reveno de lia mortotago (19. 4. 1924), oni honoras en Germanujo la grandan germanan filozofon Immanuel Kant. Sed ne sole en Germanujo, — en la tuta mondo, eĉ en Ĥinujo kaj Japanujo oni aranĝas similajn festaranĝaĵojn, kiuj havas la karakteron de potenca kulturdemostracio.

Ĉefe partoprenas en la aranĝoj la naskiĝ-urbo de l' filozofo Königsberg. La Kant'a Asocio, tiu granda filozofia organizo, kies sidejo troviĝas en Halle, laŭ invito de l' rektoro de la universitato de Königsberg festos la naskiĝtagon de Kant en tiu ĉi urbo. Ĉefan rolon ludas inter alie paroladoj pri la filozofio de Kant: „La signifo de Kant por la filozofio de la nuntempo“, „Kant kaj Herder“, „La heredado de Kant“, „Kant kaj la tuto“, „Kant kiel klasikulo de la metafiziko“, „Kant kaj la historia mondkoncepto“.

Okaze de la jubileo oni ankaŭ inaŭguros la plene aliformitan monumenton sur la tombo de Kant.

Aliaj festaranĝoj estos en Berlin kaj Halle, krome festas ĉiuj grupoj de la germana „Kant'a Asocio“. Pli grandajn festojn aranĝos la grupoj en Karlsruhe, Stuttgart, Plauen, Hamburg kaj Hannover. Ankaŭ la pacifistaj organizacioj sciigis specialajn prezentadojn.

En Nederlando okazos la plej grava festaranĝo en Amsterdam, farata de la tiea universitato subtenata de la landa grupo de l' „Kant'a Asocio“.

En Japanujo la kleriga ministerio instigis la imponan aranĝon de Kant'a festo en ĉiuj japanaj universitatoj. La tuto sekvigos fondon de landa grupo de „Kant'a Asocio“.

En Bulgarujo okazos la ĉefa festo en la universitato de Sofia.

En Rumanujo ankaŭ okazos pluraj Kant-festoj, speciale en București kaj en Jassy. Prof. D-o N. Jonescu aperigos popularan monografion, kiu estos transdonata en pluraj miloj da ekzempleroj al lernejoj kaj publikaj bibliotekoj. Samtempe elvenos rumana traduko de „Prolegomena“ de Kant. La Rumana Societo de Filozofio en București preparas grandan festlibron pri Kant.

Pluraj universitatoj en Svislando, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, en Anglujo kaj en Ameriko preparas specialajn festaranĝojn. En Ĥinujo la universitato de Pekin preparas feston.

Ankaŭ la universitato de Jerusalemo (Palestino) aranĝas Kant-feston. Samtempe aperos la unua hebrea traduko de l' Kant'a verko „Kritiko de la absoluta racio“.

Ankaŭ traduko de „Al eterna Paco“ de Kant en Esperanto de Prof. Christaller-Stuttgart estas en preparo. Tiel ankaŭ nia helplingvo plenumas sian grandan kaj idealan taskon, esti ilo por periodo de homa kulturo.

Ni publikigas mallongan biografion de Kant kaj artikolon pri lia filozofio por konatigi al la tutmonda samideanaro la verkon de l' granda geniulo.

Robert Kreuz.

Biografio.

La 22 aprilo 1924 la tutmonda sciencistaro — kaj precipe la germana — solene festos la ducentan revenon de l' naskiĝtago de la eminenta filozofo Immanuel Kant. — Lia familio estis skota laŭdevene, kaj prapatro de l' filozofo estis elektinta Königsberg en Orienta Prusujo sia loĝejo, kie Johann Georg Cant (la filozofo skribis Kant) laboris kiel selisto. El liaj multnombraj infanoj Immanuel (nask. 22. 4. 1724) estis la kvara. —



Religio severa en la spirito de la tiamatempe disvastigita pietismo estis lia edukado sub la aŭspicio de l' pastro kaj teologia konsilanto Schulz, posta direktoro de la „Collegium Fridericianum“, kie la juna Kant finis siajn gimnaziajn studojn. — De post 1740 li studadis ĉe la universitato de sia naskiĝurbo sin fervore dediĉante al la matematiko, fiziko kaj filozofio. El la prelegoj, kiuj plej multe influis la junulon, la du unuaj sciencoj estis por li fruktodonaĵ, ĉar ili vekis lian grandan talenton. En tiu tempo estiĝis lia unua traktato bazanta sur la doktrino de Newton „Pensoj pri la vera valortakso de la vivantaj fortoj“. — Laborinte naŭ jarojn kiel privata instruisto (1746–55) li doktoriĝis en 1755 per la disertacio „De igne“ (pri la fajro) kaj akiris en la sama jaro la „Venia legendi“ (rajton fari prelegojn) ĉe la königsberga universitato, kie li prelegis matematikon, fizikon, logikon, metafizikon, antropologion, naturan teologion kaj filozofion ĝis 1797, kiam malsaneco kaj malforteco devigis lin ekŝiĝi el la profesora kolegio. — En lia „Ĝenerala naturhistorio kaj teorio de l' ĉielo“ li anticipis la postan teorion de Laplace pri la estiĝo de nia sunsistemo kaj provis kunigi la mekanikan teorion kun la teologia. Li defendis en la unua periodo de sia scienca laborado la filozofion de Wolff, sed poste li ŝanĝis sian opinion influite de la anglaj filozofoj Hutchinson kaj Hume kaj inklinis al empirismo kaj skeptikismo. Tion pravas liaj verkoj „La sole ebla pruvo pridemonstracia de la ekzisto de Dio“ (1765), „Revoj de spiritisto“ kaj „Esploro pri la klareco de la principoj de natura teologio kaj moralo“. — Ne akceptinte profesoran oficon en Erlangen kaj Jena li ricevis la oficialan profesorecon pri logiko kaj metafiziko. Grava estis lia malferma disertacio „De mundi visibilis atque intelligibilis forma et principiis“ (Pri la formo kaj la principoj de la mondo videbla kaj intelekta.) Ĝi jam enhavis la transcendentan estetikon, parte ankaŭ la transcendentan analitikon, kaj per tio parton de la kritiko pri la absoluta racio. Sen-dube ĉi tiu traktato malfermas la trian periodon, en kiu li verkis „Kritiko pri la absoluta racio“ (1781), „Kritiko pri la praktika racio“ (1788), „Pri la progresoj de la metafiziko de post Leibniz kaj Wolff“, kaj aliajn libretojn, inter ili precipe gravaj pri la metafiziko, el kiuj rezultas la sistemo Kant'a. — Liaj verkoj kaŭzis sensacion en kaj eksterlande, kaj la reĝa prusa registaro vidis en la sentime instruanta kaj malkaŝe skribanta profesoro danĝeran revolucion kaj reformiston de

la religio. Fine reĝa dekreto (1794) malpermesis al la filozofo — post apero de traktato pri religio en rilato al racio — pluan prelegadon pri liaj temoj. Kant malvolonte obeis, sed ree priraktis religifilozofiajn temojn post la morto de la prusa reĝo. — La ĉefa principo de Kant en siaj prelegoj estis instigi la studentojn al la mempensado; al li ŝajnis malpli valora la dono de reguloj ol la akcelo de laŭnatura procedo de pensoformado. — Jen lia celo. — Kant estis malaltstatura, ne provizita de fortaj muskoloj kaj ne bonsana. Lia kadukeco devigis lin observi jam en la junaĝo la plej reguligitan vivotendon. En lia domo regis simpleco kaj ordo. Edzinon li ne havis, sed li tre ŝatis la ĉeston de bonaj amikoj en sia hejmo, kaj profunda amikeco ligis lin kun eminentaj homoj. — La publikan diservon li iaksis tre grava por ĉiuj spirite ne memstaraj personoj, sed superflua por klerulo kaj intelektulo. — Li mortis la 12 februaro 1804 en Königsberg kaj estas enterigita en la tiea katedralo. En 1864 la dankema patrurobo starigis monumenton al Kant. — Ĉiu, kiu studas filozofion, intime konatiĝas al liaj verkoj, kies graveco egalas kolonon eternedaŭran en la historio de nia plej nobla scienco.

M. Butin, L. K., Godesberg.

La filozofio de Kant.

La filozofio de Kant fariĝis la fundamento de nia moderna vivkompreno. Filozofio estas la scienco de la lastaj demandoj pri la „De kie? Pro kio?“ de la vivo. Jam de post la plej fruaj tempoj la plej bonaj pensuloj okupis sin pri ĉi tiuj demandoj. Esplori la sencon, la kaŭzon kaj la fincelon de ĉiu estiĝo kaj estaĵo, pripensi la farigon kaj la malaperon de ĉiuj aĵoj, penetri en la eternan estadon de la ekstera kaj interna mondo estas la temoj kaj la taskoj de la filozofo. La plej malsamaj respondoj estas donitaj, oni nomis Diaĵo la post la aĵoj estantan kaŭzon de la aperaĵoj; Dion oni konsideris unueco de la mondo, principo de l' bono, persono, koleranta kaj venĝanta Dio, patro de la homaro; oni imagis lin staranta ekstere de la mondo, vivanta en la inferno de la homoj; neniu klarigo kontentigis kaj ĉiam de novo oni provis solvi ĉi tiun enigmon.

Jen estiĝis Kant, „la ĉion frakasanto, la ĉion detruanto“, kiu instigite de la anglaj skeptikuloj, precipe de Hume, vekite el la dogmateca dormo, entreprenis montri la limojn de la homa ekkoneca kapablo. Laŭ lia opinio la morala flanko estas pli grava ol la intelekta en la vivfilozofio. La moraleca leĝo estas decida.

Por ĝuste kompreni kaj estimi Kant'on, oni devas kompreni lin el la sfero de lia tempo, kaj estas necese rigardi la spiritaĵajn fluojn tiutempajn. Veninta estis la tempo de la racionalismo, naskita el la renesanco; ĝi klopodis liberigi sin de la tradicia dogmatismo, kiu provis apogi la ekleziajn dogmojn sur la scienco. La racionalismo aspiris kaj esperis, ke sukcesos al la racio starigi sistemon sen aliaj premissoj, sen la Biblio, sen Aristotelo, sistemon, kiu bazas sur racie pruveblaj verecoj, en kiu Dio, naturo, vivo kaj fariĝo estos klare kaj senrestaje kompreneblaj.

Kontraŭlo de la racionalismo estis la pietismo. Ĉi tiu pietismo estas la daŭrigo de la reformacio, por kiu la religia interna vivo estas la ĉefaĵo; la religio estas persona afero de ĉiu homo, kaj konvertiĝo, interna transformiĝo, la unuenco kun Dio, alivorte: vivanta kaj sincera kristaneco, estis la frukto de la reformacio. Sed ankaŭ post la morto de Luther la kristanismo estis disputobjekto por la teologiaj sciencistoj kaj rimedo atingi la estrecon super la popolamasoj. La pietismo kiel kontraŭfluo havas popularan originon. La racionalismo kaj la pietismo batalis kontraŭ

la estanta sistemo en tiu rilato, ke ambaŭ aspiris la personecan liberecon, ke ambaŭ akcentis la propran internan vivon kiel specialaĵon de la personeco, ke ambaŭ deziris esti liberigataj de la spiriteca kuratoreco.

Kiel ventego invadis la krifikismo de Kant en ĉi tiuj bataloj de l' spirito, ĉion detruante kaj neniiigante. Unuflanke li montris la limojn al la homa racio, aliflanke li dekondukis la pietismon en la sferon de la moraleca leĝo, levante sendepende de la religia kredo la homan volon al alleco, kiu estas esprimata en la »kategorio (nepra) imperativo«: „Agu tiamaniere, ke la maksimo de via volo povu servi ĉiutempe kiel principo de ĝenerala leĝo!“

El la multaj verkoj de Kant ni preparolu la plej gravajn. Lia ĉefverko estas la „Kritiko pri la absoluta racio.“

En ĝi li esploras la originon; la amplekson kaj la limojn de la homa ekono. Li diskutas, al kiu celo kaj rezulto la homa racio povus alveni en la ekono, se la sperto estas eksigata. El liaj esploroj rezultas, ke la objekto de la metafiziko superas kaj transpasas niajn spertojn. Pro tio ankaŭ la metafiziko ne povas esti objekto de la scienco. Ĉar ĉio, kion ni scias, bazas sur nia sperto. La sentoj peras al ni la aĵojn de la ekstera mondo; ĉio, kio estas malantaŭ ili, la aĵo „en si mem“, estas al ni eterne kaŝita. Nia tuta ekoneca kapablo estas do limigita al la ensentaj aperaĵoj. Kiel „formoj apriori“ estas donitaj al ni la pensformoj spac kaj tempo kaj krome la kategorioj de la racto.

La tri fundamentaj ideoj de la Kant'a ekoneca teorio estas:

„En la reala vivo ni nur perceptas la aperaĵojn kaj ne la aĵojn en si mem;

pro tio la sperto estas la sola teritorio de nia ekono. Se la ekono tamen volas transpasi la limojn de la sperto, la homa spirito implikiĝas en la plej grandajn kontraŭdirojn.“

La filozofio de Kant estas esence ekzameno de la homa ekoneca kapablo; ĝi estas krifikismo.

Kant refutas la ĝeneralajn pruvojn pri la ekzisto de Dio dirante, ke ĉi tiuj pruvoj ne sufiĉas. Plej facile komprenebla por la nefakulo estas la tiel nomata teleologia pruvo, kiu argumentas el la laŭleco en la naturo, ke ankaŭ ekzistas cel-dona kreanto. Se do ĉie en la naturo evidentiĝas la laŭleco, saĝe kaj inteligente aganta kreanto devas esti la kaŭzo. Ĉi tiu necesa kaŭzo devas esti reala estaĵo, do ĝi devas ekzisti. Ankaŭ ĉi tiu pruvon Kant ne rekonas deviga kaj konvinkiga, ĉar el la laŭleco de la formo de l' mondo li konkludas sufiĉantan kaŭzon de ĉi tiu formo; pro tio nur la konkludo pri kreinto de la formo de ĉi tiu mondo, do arkitekto de la mondo, estas alasebla, sed ne pri mondokreinto. Laŭ Kant la ekzisto de plej alta estaĵo povas esti nek pruvata, nek refutata.

La opinio de Kant pri la religio estas pro tio atentinda, ke li ekstigas kaj deduktas ĝin el la la moralo. Laŭ Kant la religio estas la kompreno de niaj moralaj devoj kiel Diaj ordonoj kaj la eklezio estas etika respubliko, kiu celas la efektivan kaj plenumon de la moralaj devoj. Eklezio de Kant devas bazi sur moralecaj motivoj de racio, kaj ju pli maturiĝas la racio, des pli bone ĝi povas malhavi la „statutarajn ordonojn“, t. e. la dogmon. —

Se ni volas kompreni la duan gravan verkon de Kant, la „Kritiko pri la praktika racio“, ni devas okupi nin pri la interna vivo de ĉi tiu eminenta

La Paska Konferenco de Genève.

Kiam niaj legantoj ricevos tiun ĉi numeron de ET, fervoraj laboremaj samideanoj sidas en Genève kaj priiraktas gravajn propagando-problemojn. La sukcesoj de Esperanto en la lastaj jaroj, de kelka tempo multobligante, antaŭvidigas la nepran necesecon koncentri ĉiujn niajn fortojn. Paroli pri la maniero de plejbla utiligado, kiamaniere ni povas laŭsisteme kaj metode organizi nian tutan propagandon, tio estas la ĉefaj demandoj, respondotaj de la konferenco de Genève.

Specialan atenton havos la rezultoj de la pasintaj fak-konferencoj en Genève kaj Venezia. Du sferojn Esperanto jam ekkonkeris: la instruajn kaj la komercan. Defendi tiujn konkerojn estas

nepra devo de ĉiu aktiva esperantisto konsideranta, ke nun ekkomenciĝis la praktika esp. propagando. Esperanto jam enpeneras en trian sferon plej gravan, tiun de la radiotelefono. Ankaŭ pri tiu ĉi problemato traktados aparta kunveno de oficiala delegitaro de diverslandaj radio-asocioj en Genève.

Tiuj, kiuj ne povas ĉeesti la konferencon, kun profunda intereso sekvos la rezultojn de ĝi, por povi entrepreni la necesajn laborojn laŭ la diskonigata sistemo.

Restas al ni do nur la tasko, kuraĝigi la kunvenontojn de Genève kaj alvoki al ili:

Bonŝancon kaj sukceson al viaj laboroj!

Detalan programon de la konferenco ni ne povas enpresii. Lasiminute ni sciĝis ankoraŭ, ke la kunvenontoj plejparte loĝos en oficialigita

hotelo: Hôtel de la Résidence, Route de Florissant 11, Telefono 2567.

Kiel reprezentanto de ET ĉeestos la konferencon s-o redaktoro R. Kreuz.

R. Kr.

viro. Prezentiĝas granda tragedio. Ĝenerale oni kredas, ke Kant estis gajnantura homo, kiu ŝatis la ĝojojn en amikaj rondoj; tamen li estis homo de la naturo de Hiob, kiu akre luktidis simile al la heroo de la malnova testamento kontraŭ Dio kaj si mem kaj fine alvenis al la konfeso: „Grandaj estas la mirakloj kaj nemezurebla la gloreo de viaj agoj kaj faroj!“ Simile sonas la eldiro de lia Diadoro ĉe la rigardo al la stelornamita ĉielo: „La stelornamita ĉielo super mi kaj la moraleca leĝo en mi ĉiam denove estiĝas en mi admiron!“ Sed kio estis okazinta antaŭe en la animo de ĉi tiu homo? Oni nomis Kant-on la „Ĉion frakasanto“, la ĉion detruanto. Rajte! Sed ĉi tiu frakasado kaj detruado okazis antaŭe en sia propra interno. Edukate en profunda pietismo Kant post longedaŭra pripensado venis al la nihilista opinio, ke la mondo, kia ni ĝin konas aŭ kredas koni, tute ne estas io vera kaj reala, sed nur ekzistas en nia imagio. Disfalas ĉi tiu mondo de lia juveca kredo. Ni nur povas imagi, kiaj luktoj traskuis lian internon. —

En la kritiko pri la absoluta racio la homo kaj kun ĝi la mondo kvazaŭ negative estis juĝitaj, ĉar al la homa racio ĉiuj apogoj estis rabataj kaj aliflanke la realeco de la mondo estis pridubata; male en la kritiko pri la praktika racio la homo ree estas juĝata laŭ sia digneco per la moraleca leĝo, kiu en li regas apriorie. Kiel grandioze la moraleca leĝo efikas en li, klarigas el tio, ke Kant komparas ĝin eflikon kun la emocio, kiun vekas en li la stelornamita ĉielo. Laŭta voĉo krias en lia koro: Dio, libereco kaj nemorteco ekzistas kiel postuloj de la praktika racio. Per la jam citita kategorio imperativo, per la intuitiva certeco de la sankteco de la moraleca devo Kant savis sin el la malespero al la bordo de la ideala mondo. —

La germanaj poetoj Schiller kaj Goethe ne opiniis la mondon senestigita de la reala fundamento, kaŝita en la vualo de la idealismo, malfelice, kaŭzo de malespero, sed kontraŭe taksante la malvaloron de la tiel nomata reala mondo ili sentegis la grandvaloran feliĉigon de la transcendentia mondo, la mondo de la idealo.

La grandega merito de Kant estas, ke, senradikiginte la teorion racion, li preparis la vojon al la kredo de moraleco, la praktika racio, kiu ekkonas la homan destinon en la devo. Lia duktrino estigis grandan influon sur la samtempuloj

kaj la posteuloj. Eĉ se lia filozofio ne estas absolute libera de kontraŭdiro, ĝi tamen estis fruktdona por la spirita vivo ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en la tuta civilizita mondo.

Friedrich Jahn, Godesberg.

Monumento al Zamenhof.

(Raporto de la Organiza Komitato.)

De kiam ni laste raportis, (vidu „Esperanto“ marto 1924, kaj „Esperanto Triumfonta“ n-o 180) ni havas la honoron sciigi ke la monumento, post kontentiga kontrakto, estas jam sub la ĉizelo de la skulptistoj en Aberdeen, Skotlando. La progreso de ĝia kompletigo daŭras senĉese kaj ĝi estos finita senprokraste. La materialo uzata estas blank-griza granito de Kennay-a kvalito, kiu havas la reputacion de pleja longedaŭremo en la mondo.

Kiam la monumento estos finita, ĝi estos enpakata en ses aŭ sep grandajn skatolojn, kiuj pezos inter 7 kaj 8 tunoj, ensipigata en Aberdeen por marvojaĝo al Danzig, kaj de tie fervoje aŭ ŝipe sur la Vistulo rekte al Varsovio por starigo. Personoj kaj societoj, kiuj kavas bonajn rilatojn kun ŝip-kompanioj sur tiuj vojoj kaj povas influigi ilin transporti la monumenton senpage al ĝia destinita loko, bonvolu tion fari, aŭ doni konsilon al la Honora Sekretario, se ili scias rimedon por tion efektiviĝi. Oni atentigu la ŝip-kompaniojn pri la grandega reklamo, kiun ili ricevos intersaĝe je tiu servo. La Organiza Komitato devigas sin aperigi almenaŭ po unu artikolo pri tiu fako en ĉiu esperanta gazeto aperanta tra la mondo.

La Org. Kom. sendis petiskribon al la pola ambasadoro en Londono pro permeso ke estu permesite eniriĝi la monumenton en Polujon, ne pagante la kutimajn limdepagojn kaj aliajn dogan-taksojn. Laŭ la respondo de la ambasadoro, tiu peto estas transsendita de li rekte al la Pola Registaro en Warszawa. Ni do petas ĉiujn gravajn naciajn asociojn, ke ili tuj skribu oficialajn leterojn al la ambasadoroj de siaj landoj, en kiuj ili subtenu nian alpeton. Tiaj komunikoj, kiuj venos el diversaj flankoj, helpos por havigi la necesan koncesion.

Ĝis tiel klare, ke eĉ interpretoj estas preskaŭ superflua. Sed, ni havas „Akademion“ kaj „Lingvan Komitaton“ kaj pro tio estas interese demandi, kia estas verdire ilia tasko. Ne grava kaj preskaŭ superflua estas laŭ nia juĝo la devo reprezenti; ĉar tio signifus nur plimuligon de la organizaĵoj nebezona. Restus do nur la tasko gardi, ke la „fundamentaj“ reguloj ne estu malobeataj, aŭ alivorte oficiale malaprobaj ĉiujn publikigajn aĵojn, kiuj ne harmonias kun ili. Konsiderante tion ni ne komprenas, por kio la Lingva Komitato bezonas tiom da anoj. Por la kontrolo de la verkoj, t. e. ĉi li estas laŭ fundamentaj, sufiĉas eta komitato el teoriiuloj. En la nova listo de la Lingva Komitato oni vidas efektive la nomojn de kelkaj „pruvitaj“ teoriiuloj. Bone, la teorio estas ilia tasko, sed ili malmultigis. Tro multe da kuiristoj fuŝas la kaĉon. Kaj ilia tasko limigu je la skizita kontrolo.

Cetero — dank' al Dio — la literaturo estas farata de ni verkistoj! Sed ankaŭ ni literaturistoj estu kontrolataj. Multenombra, diverslanda komitato el praktikistoj estas necesa, por kontroli la stilon kaj la pure literaturan valoron de la verkoj. Ekzistas ja Esperantista Literatura Asocio, sed unparte ĝia laboro apartenas al L. K. kaj aliparte ĝia programo ne estas sufiĉe sistema. Krom tio la plej bonaj verkistoj malinklino subigi al asocio, kies akceptemo estas trete senskrupula. Al mi sin prezentas la ideo pri sendependa unuigo de veraj esp. verkistoj, kiuj el sia mezo elektus komitaton kompetentian laŭ pruviita sperteco kaj aŭtoritato sur stila kaj literatura kampoj. Ĉiutokaze oni esceptu ĉi tie la teoriiulojn. Mi ne opinias, ke ni embarasiĝus, kvankam mortis Zamenhof, Grabowski kaj — kiel esperantisto — bedaŭrinde ankaŭ Kabe. Novaj steloj aperis kaj estas aperontaj; en iliajn manojn oni metu nian literaturon. Ili kunigu kaj kristaligu. Sed ili ne kolektiĝis en L. K. La arto oni ne penu bridigi (kaj certe neniam bridigos!) per la katenoj de „oficiala instituto“ aŭ de iujn instituto, kies membroj ne estas senescepte veraj artistoj.

Laŭ nia literaturo oni iam juĝos nian aferon; ĝi estas la esprimo de nia valoro, de nia povo, de nia tendenco. Ni zorgu, ke el la nunaj hazardo kaj haoso baldau elkresku arbo potenco de plej alta kulturo, forto kaj beleco.

Zanonj.

T. e. kies juĝo pri akceptindeco aŭ neindeco de literaturaj verkoj kelkfoje ne estas sufiĉe severa, kvankam ĝia volo estas nepre bona kaj ĝia laboro ŝatinda. — Red.

Byron

1824—1924. (19 aprilo.)

Unu el la plej grandaj anglaj poetoj nun estas honorata en tuta Britujo okaze de l' centjara reveno de lia mortotago. Lordo George Gordon Noel naskiĝis la 22 januaro 1788 en London. Li estis serenemulo kaj sentimentulo. Pro sia mal-feliĉa edziĝo kun sinjorino Milbauke li estis izolata de la angla societo. Li elmigris al Svislando kaj vivis tie kun itala grafino Guiccioli de post 1816. Li havis la intencan partopreni la grekan liberigo-batalon. Li estis tre intensa laboranto. Aperis ne malpli ol 50 volumoj. Plej konataj estas „La pilgrimo de junkro Harold“, „Giaur“, „Corsar“, „Manfred“, „Cain“, „Sardanapal“, el liaj satiraj eposaĵoj „Don Juan“. Li ankaŭ estis lirikisto kaj faris multajn versaĵojn. Kune kun Shelley li finis ĉe la lago de Genève la verkon „Prisoner of Chillon“. Li mortis la 19 aprilo 1824 en Missolonghi.

El la melodioj de Lord Byron.

Ploru pri plorintoj!

Ploru pri plorintoj ĉe l' Babilon-rivero, Kies land' — dezerto, sanktejo en mizero! Ploru pri la harpo Judea, nun rompita, Dia land', per homoj sendiĝn nian loĝita!

Kie pied-vundojn Izrael lavos, Dio? Kiam re-dolĉonos la Cion-melodio? Kaj per himnoj judaj reĝojos tiuj koroj, Kiuj foje vibris je la ĉielaj horoj?

Gentoj, ho, vagantaj en plena suferado, Kie vi ripozon ektrivos de l' vagado? Vulpo trovas truan kaj neston la kolombo, Por homar' ekzistas land', por Izrael — tombo.

Apud Jordan-bordoj.

Apud Jordan-bordoj araboj nia vagadas, Sur Cion-altaĵo malplii blasfemadas. La Bal-adoratoj sur Sinaj-mon' genuas. Kiaj viaj tondroj, Di', ilin ne detruas?

Kie leĝ-tabulojn vi donis, Di', gravure, Kie al Izrael ekbrilis vi lazure. Via glori' volvita en faira nub' blindiga, Kies alrigardo jam estis pereiga, —

Tien, Di', denove en fulm' malsupreniru Kaj el man' la glavono de l' subpremanto tiru! De l' tiran' ĝis kiam suferos land' de gloro? Via templo restos ĝis kiam sen adoro?

El la angla lingvo tradukis J. D. Applebaum.

Gramatiko — Stilo — Literaturo.

(Rim. de red.: Kvankam tiu ĉi artikolo estas skribita jam antaŭ kelka tempo, ni opinias ĝin ankoraŭ sufiĉe aktuala.)

La gramatiko de lingvo natura ne estas leĝaro a posteriori, laŭ kiu sin direktu la lingvo, sed, male, konsistat a priori, ke tiel kaj tiel la lingvo estas praktike uzata. Ĉe lingvo elpensita laŭsajne la afero estas inversa. Sed nur laŭsajne! Ĉar en la realeco ankaŭ ĉi tie la gramatiko estas nur konstato a posteriori, t. e. en la senco, ke la elpensinto en sia lingvo „ariefarita“ obeis la komunajn regulojn gramatikajn de ĉiuj lingvoj naturaj. (Se tion li malatentus, li naskus mortintan idon; vidu Volapik.) La sola diferenco inter natura kaj elpensita lingvoj do estas, ke la „reguloj“ de la unua kreigis hazardo de la daturo de multaj jarcentoj kaj tiuj de la dua estis starigataj intence kaj logike en proporcio je mallonga tempo. Lingvistaj spertoj de diversaj popoloj kaj epokoj do kvazaŭ kristaliĝis subtile je unu perfekta tuto.

La garantio por ĉi tiu perfekta tuto estas ĉe ni „La Fundamento de Esperanto“. Laŭ mia opinio ni ne bezonas personajn garantiantojn, ĉar Zamenhof ĉion aran-

La kupon-kartoj kaj monaj aferoj.

Samideanoj kaj societoj, kiuj vendas kupon-kartojn aŭ parton da ili, estas petataj tuj alsendi la monon, aŭ al la subskribanto, aŭ al la Honora Kasisto W. M. Page, 31 Queen street, Edinburgh, Skotlando. Ni aldonas analizan liston de la mondonacoj ĝis nun ricevitaĵi, aranĝita laŭ la landoj. Oni rimarku ke multaj landoj, kie laŭ nia scio ekzistas esperantistoj, kontribuis al la kaso, aŭ nenion, aŭ nur bagatelajn sumojn. Ne estas ankoraŭ tro malfrue por ripari tiun mankon, ĉar la tuta sumo bezonota ne jam troviĝas en la kofroj de nia kasisto.

Table with 3 columns: Land (Aŭstrio, Aŭstralio, Algerio, Belgio, Britujo, Brazilio, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Estonio, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo), Amount (£), and Amount (₯). Rows include countries like Aŭstrio (13-4), Aŭstralio (55-16-5), Algerio (4-0-0), Belgio (10-19-5), Britujo (98-19-4), Brazilio (4-2-0), Ĉeĥoslovakio (10-0-9), Danujo (3-19-5), Estonio (1-0-0), Finnlando (3-18-3), Francujo (9-12-0), Germanujo (5-13-2), Hispanujo (2-19-2), Hungarujo (11-9).

Estas notinde atentigi, ke Britujo (Anglujo, Skotlando, Kimrujo kaj Irlando) staras je la unua vico kun £ 98-19-4. Venas poste malgranda Aŭstralio, kun £ 55-16-5; por tiu eleganta sumo ni devas danki al niaj senlaciaj kunlaborantoj en Melbourne, s-oj Pyke kaj Drummond. Poste venas Nederlando kun £ 25-18-5, Usono, la lando de la oro, kun £ 20-4-2, Belgio kun £ 10-19-5 kaj Ĉeĥoslovakio kun £ 10-0-9. Ni scias ke en tiu lasta lando atendas nin ankoraŭ kelkaj sumoj kiuj venos tre baldaŭ.

La listo datumas je ĉirkaŭ la mezo de marto, kaj oni ne forgesu depreni de la tuto la ĝisnunajn elspezojn. (Vidu lastan bilancon de la niŭrnberga kongres-raporto). Ni povas aldoni, ke la sekretariaĵi kaj kasistoj elspezoj estas trege malgrandaj, ĉirkaŭ 1 1/2% de la sumo kolektiita, elspeziata entute por poŝtmarkoj.

Ni ripetatas la urĝecon de alsendo de mono tiel eble kiel baldaŭ.

En la nomo de la Organiza Komitato.

J. D. Applebaum, Hon. Sek. 11, Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

Esperanto-Korespondado.

Trafa letero ricevita de la redakcio.

Kara korespondemulo!

Bonvolu pripensi jenon! Vi invitas samideanon, por ke li viziti vin. Li — plej ofte nova esperantisto — venas esperplene, por travivi kelkajn agrablajn minutojn kun vi. Li volas provi, ĉu la vortoj de lia instruinto pri la sincereco kaj ofereco inter la esperantistaro ne estas fanfaronaj.

Plenfide li frapas je via pordo; vi malfermas, li salutas ĝentile, kaj vi — ne rediras eĉ unu salutvorton kaj ree fermas la pordon antaŭ lia nazo. Ĉu estas honeste tiel seniluzigi pienfidemulojn?

Tiamaniere vi agadas, se vi per anonco petas pri korespondado kaj eĉ ne unu fojon respondas. Mi komprenas vian retenon, ĉar la respondo al 50 aŭ pli ricevitaĵi p. i. estas afero iomete multekosta. Tial mi proponas al vi: dispartigu la respondadon je kelkaj monatoj sed — respondu al ĉiu skribinto almenaŭ unufoje per ilustrita poŝtkarto kiel presajo.

Al tiu, kun kiu vi volas daŭrigi la korespondadon, skribu pli ol nur vian nomon. Ĉiu komprenos kaj ŝatos tian agadon.

Via ĝisnuna konduto ofte kaŭzis indiferentecan ĉe novaj adeptoj kaj poste deturniĝon de nia afero. Sed la arda deziro — certe ankaŭ la via — ke nia fidela anaro de tago al tago pligrandiĝu, devigas min al la peto, ke vi de nun agu laŭ la propono de

via sincera korespondemulo Beni.

Esp. Radioparolado de Moskva.

La 30 aprilo oni faros en Moskva stacio radiotelefonan paroladon pri la atingitaj rezultoj pere de la lastjaraj radiotelefonaj paroladoj en Esperanto.

Ĝi komenciĝos tute precize je la 14.30 h. (M.E.T.) Ondolongo 3200 m (trmil ducent) ne kiel erare komunikite 32000.

Aŭskultantoj estas petataj sendi raporton pri aŭdebleco al Rusujo, Moskva Radiouzel, s-o ĉef-inĝeniero A. L. Pipkeviĉ.

De la nombro de sendontoj pri aŭdebleco de radio-esperantaj paroladoj dependas pluaj sukcesoj ĉe radiosfero en Rusujo. V. Javorenkov.

Al hodiaŭa numero estas aldonita la aprila numero de „Revuo“.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciĝojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unufanke skribita, sed ne inter administraciistoj aŭ privataj sciĝoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomi!).

Landoj.

Danujo.

Odense. Ĝus ĝeneralkunveno Odense Esp. Societo. La prezidanto, s-o Carlsen, komerca lernejestro, raportis. La movelekta estraro konsistas el: prez. s-o A. Christensen, sekr. s-o A. Andersen, kas. s-o Vitek, kons. s-ino Strömsen, s-oj Ravnlökke, Henriks kaj Hartzberg. — „Konversacia Klubo“ funkcias bonege. Regulaĵi kunvenoj 1. kaj 5. vendredo en ĉiu monato. Ankaŭ tie s-o Christensen estas prezidanto. — „Esp. Junulara Rondo“ ĵus fondiĝis. La gazetaro de Odense estas tre favora al Esp. — En la oficiala urba leĝoĉambro troviĝas ara da esp. libroj, vortaroj kaj gazetoj, inter ili „Esperanto“ de UEA kaj ET.

Franccujo.

Paris. La grava sekcio de Rouen de la Respublika Komitato de Komercio kaj Industrio en sia kunsido de la 21 marto voĉdonis favoron al Esp. dezirprinon.

— La kurso de Esp. per senfadena telefono en Genève estas anonciata la 1 apr. en „L'Ouvreur“, „Le Petit Parisien“ kaj „L'Ére Nouvelle“.

Perpignan. La oficiala ĵurnalo (Journal Officiel) enpresis en sia numero de 20 marto leĝan deklaron de esperantista societo „Amika Rondo“ kies sidejo estas 5, rue de la Savonnerie, Perpignan.

— Roussillon'a (Esperanto) Oficejo* ĵus starigis. Tiu oficejo interligas la aĉetantojn de ĉiuj landoj kun la vendistoj de Sudfrancujo. Adreso: Place de Banque, Perpignan (telefono 6.20).

Germanujo.

Berlin. La 18 marto monata kunveno. Parolis s-o Schwarzschild pri iloj kaj helpioj por moderna komercio. Venonta kunveno la 15 aprilo je la 8 h. en kafejo Josy, Zamenhof-memor-vesperoj.

— La 21 marto okazis porĝepatra vespero aranĝita de la Lebensgemeinschafts-Schule en Berlin-Lichtenberg. Laŭ lerta aranĝo de instruisto Neuendorf, la Esperanto-gelerantoj, infanoj de 10-14-jaroj, ludis teatraĵojn, silmuet-ludojn laŭ Esperanto-kantoj, deklamis kaj kanitis germane kaj esperante. La granda salono de „Kern's Festsäle“ estis plenege.

— Novaj kursoj kamenciĝos en Steglitz, Friedenau kaj Charlottenburg S-ano Mann, Anglujo, instruos Esperanton kaj anglan lingvon en Luisen-gimnazio, Berlin N, Turmstr. 87. La angla kurso komenciĝas la 2 aprilo je la 8 h., la esperanta kurso la 8 aprilo samtempe.

— La 26 marto okazis kunveno de la berlina UEA-anoj sub gvido de la ĉefdel. s-o Blankenheim. Ĉeestis pli ol 50 membroj. H. N.

Porĝepatra vespero de la Esperanto-lernejo Potsdam.

La 15 marto okazis en Potsdam en la granda Nikolaj-salongo festivespero, aranĝita por pli ol 80 ĝeinfanoj de la Esperanto-lernejo Potsdam kaj ties ĝepatroj. Dank' al donacoj de en-kaj eksterlandaj esperantistoj ĉiuj infanoj kaj ties ĝepatroj ricevis donace kafon kaj kukon. Dum tiu ĉi vespero, kiu unue havis la celon ĝoigi la diligentajn ĝelernantojn kaj due montri al la ĝepatroj, kion la infanoj lernis en kaj per Esperanto, la infanoj, 10-14-jaruloj, ordigitaj laŭ la diversaj Esperanto-klasoj, prezentis horajn kaj solo-kantojn, dancetojn, mallongajn dialogojn, deklamojn ktp. en Esperanto. Inter tiuj ĉi prezentiadoj estis speciale ĉarma kaj amuza tiu de grupo de geknaboj, kiuj ludis malgrandan teatraĵon. Ili imitis anojn el diversaj nacioj, kiuj renkontiĝis sub la verda standardo por komuna vojaĝo al kongreso. Eĉ negro kun oraj ringoj en nazo kaj orelo ne mankis inter la „kongresanoj“, kaj li dum la posta kafrinkado tute ne demetis la belan maskon sed restis nigro!

Rektoro Helmholz per entuziasmaj vortoj parolis pri la vivo kaj verko de Zamenhof. Dum la kafrinkado kelkaj membroj de la Esperanto Grupo Potsdam ĝoigis la gastojn per muzikaj prezentiadoj, kantado ktp.

Helmstedt. 15 marto finiĝis kurso ĉe la altopol-lernejo. Gvidis s-o instruisto Pape. Finlensis 6 pers. Samtempe nova kurso inter ĝeunuloj (18-21 j.) Partoprenantoj 22; gvidas s-o E. Lier, del. de UEA. Aliĝis ĝis nun 5 pers. al UEA. — La lokaj gazetoj publikigas ĉiutage artikolojn pri Esp. Kunvenoj ĉiumerkrede je 8 h. en „Hotel Reichshof“.

Italujo.

Brescia. Esperanta kurso estas aranĝata ĉe la kultura asocio „Circolo Filologico“ de la s-ano Gaetano Facchi, del. de UEA, kiu baldaŭ ankaŭ donos kurson de Esp. por laboristoj ĉe la Melis Lernejo „Moretto“. La 21 marto s-o advokato kavallero A. Urba, prez. de Itala Esperantista Federacio, faris en nia urbo sukcesplenan paroladon pri la esperanta movado, kiu tre bone ekis per vorti novajn ĝesamideojn.

Mantova. La 29 marto en la sidejo de la loka Esperantista Grupo okazis esperanta parolado de D-o Umberto Toschi, ĝenerala sekretario de la FEI, pri la temo „Tra vivajoj de esperantistoj en la mondo“. La interesa parolado estis sukcesoplena.

— Dank' al la sindona agado de s-ano Cesarino Sala nia movado inter lokaj poŝticiŝtoj pligrandiĝas.

— Nia s-ano Morfini, filino de ĉi tiea del. de UEA, malfermis perfektigan kurson okaze de sia mallonga ĉeesto en nia urbo.

Litovio.

Biržai. Lastatempe ĉi tie ĉe loka gimnazio fondiĝis Esperanta Sekcio. Aliĝis 40 anoj. Kiel esiraron oni elektis: prez. Petras Lapiene, kas. Jonas D. Dagis kaj sekr. Jonas M. Dagis. Sekcio jam havas negrandan bibliotekon kaj abonas kelke da esperantaj ĵurnaloj. Helpis la sekcio organizi kaj donacis parton de la libroj ĉi tiea malnova s-ano Liudas Aiseika.

Polujo.

Bochnia. Granda interesiĝo pri Esp. flanke de lokaj estraroj. Antaŭ jaroj la urbo estis konata pro sia esp. movado dank' al la sindona, sencesa propagando de la poste alitunde transiĝinta Prof. L. Kronenberg.

Olbraĉicze apud Stonawa (ĉeĥa Silezio). Ĉi tie ĵus finiĝis kurso kun 12 novaj adeptoj de nia lingvo.

Poznań. La foirestraro de la ĉi tie de 28.4. — 5.5.24. okazanta Poznańa Foiro disponigis al la loka „Pola Esp. Societo“ senpagan ejon, en kiu oni aranĝos — kiel dum lasta jaro — ekspozicion de esperantaĵoj. Ĉiun materialon danke akceptos „Pola Esp. Societo“, Poznań, Długa 7.

Warszawa. Dum pentekosto la 8-9 junio okazos la tiu ĉi-jara konferenco de „Pola Esp. Societo“. Oni atendas reprezentantojn de ĉiuj filioj. Esperble ankaŭ baldaŭ okazos la dua tiupollanda Esp. kongreso.

Pola Esp. Servo, Bydgoszcz.

Zawiercie. Dank' al la nova kaj jam tre bone konata lernolibro de Leo Turno, nia lingvo estas multe instruita en ĉi tieaj unua-kaj duagrada lernejoj. La instruadon kondukas s-o M. Sikorski.

Rumanujo.

Alba-Iulia (Transilvanio). Novan kurson gvidas s-o R. Pospisil, del. de UEA, laŭ la metodo de la Kursa Lernolibro de D-o Privat.

Arad. La 26 febr. malfermiĝis nova kurso, gvidata de s-o Siefano Ferency, del. de UEA.

București. Nova kurso por studentoj de juro, gvid. de s-o Demetrio Dinca.

Cernaŭti (ĉefurbo de Bukovino). En la urba Berlitz-lernejo, direktata de Prof. D-o C. Sotropas, malfermiĝis pluraj novaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj, gvidataj de s-o majoro Hesenöhrl, modele aganta organizanto.

— La loĝantaro kaj la gazetaro de la urbo estas tre favoraj al Esp. La ĉiutaga gazeto: Czernowitzer Allgemeine Zeitung, Czernowitzer Deutsche Tagespost kaj Czernowitzer Morgenblatt malfermis konstantan Esp.-angulon.

Cluj (Transilvanio). Nova kurso en la Uniteria Kolegio, por 20 partoprenantoj. Gvidas s-ano Petro Reday-Stefan. La kurso daŭros 2 monatojn.

Orsova (Banato). Kinematografia teatro „Olimpia“ prezentas esp. aŭson por prop. celo.

— S-o Stefano Koch, oficisto ĉe la Hungara River-kaj Marŝipvetara Societo, gvidas kurson por 8 partoprenantoj, komerclernejan.

Esperanto Centro Rumana, Bukurești.

Rusujo.

Tveri. Esperanto-movado ĉi tie bazas sur Esperanto-rondetoj 1. en laborista klubo „Tekstilnik“ (Taksfabriko), 2. en poŝt-telegrafista klubo, 5. en 29-a lernejo de 2-a ŝtupo, 4. en kavaleria eskadrono, 5. en komerca instituto.

Apogante ĉi tiujn rondetojn la loka gubernia komitato de SEU nuntempe komencis grandan agadon.

Tuj ĉiuj membroj de la loka filio de SEU reregistras sin, pagas kotizojn, ankaŭ multaj novaj kamaradoj membrigas. La komitato estas reelektita ĵenkonjiste: K. K. Varankin, Lebedev, Sapegin, Ickoviĉ, Manuhina kaj kandidatoj: Gavrilov, Pazuhin, Fedorova.

Gvidas sekciojn membroj de l' komitato kaj speciale invititaj kamaradoj. Ĉe la klubo estas malfermita esperanta biblioteko. Ĉiudimanche laboras voĉa leĝejo. Oni legas artikolojn el Sennacia Revuo kaj ET.

La 15 aprilo aperis unua numero de esperanta murgazeto „Radio“ (ĝimnataro) kun 15 diversaj fakoj, komisiitaj al specialaj redaktantoj.

Intereso pri la laboro flanke de esperantistoj kaj ne-esperantistoj estas granda. Aktiveco de l' membroj ankaŭ. Loka ĉiutaga gazeto „Tverskaja Pravdo“ preskaŭ ĉiutage enhavas artikolojn pri Esperanto aŭ tradukojn el Esp.-ĵurnaloj.

14 aprilo oni aranĝis spektaklon-koncerton je memoro de D-o Zamenhof, kiu preparis sekciojn de la klubo.

Estas organizita gubernia protektorato de SEU el influaj personoj.

Kun granda piezuro lokaj esperantistoj aŭskultas radioreportojn kaj koncertojn el Moskva. (V. Varankin.)

Odesa (Ukrainio). Fininte sian esperantan laboron en Odesa s-o Lingel aranĝis la 10 aprilo kurson en la stacio „Odesa-Zasiava 1-a“ por 13 personoj. Nuntempe li jam aranĝis la duan similan kurson en la stacio „Razdjelnaja“ por 27 personoj.

Fakoj.

Polico.

Kiel la legantaro de ET jam sciigis pri tio, en Rumanujo Esperanto ĝoige progresas en policistaj rondoj.

En intereso de pli vasta propagando estus dezirinde, ke la policistoj-samideanoj el aliaj landoj sendu informojn kaj grupfotojn pri policistaj esp. kursoj al Esp. Centro Rum., Alea Suter 19, Bukurești.

Nekrologio.

Nikola Bubalo †.

Li ne plu estas inter ni. Talenta, brava, modesta li ne okupis sin pri propagando, li studis kaj laboris. Certe mi ne eraras skribante, ke li estis la plej kompetenta en lingvaj aferoj esperantisto en Jugoslavio. Antaŭ la milito li estis unu el la fondintoj de „Bosnia Stelo“ en Sarajevo, kies sekretario li estis. Jam de longe mi sciis pri li kaj pri lia laboro, sed persone mi konatiĝis al li nur la pasintan jaron en Zagreb. Kvankam ankoraŭ malsana post grava operacio, li skribis. Sur la tablo kuŝis amaso da diverslingvaj esp. gramatikoj, li kvazaŭ abelo elektis la plej bonan sukton el ĉiu floro por verki la duan eldonon de la esperanta gramatiko de D-o Maruzzi. Antaŭ kvin jaroj li laboris je granda verko: kompleta kroata-esperanta vortaro, kiun li finis dum la pasinta somero. Lia kompleta Esperanta-kroatiserba vortaro estis jam eldonita la pasintan jaron de Sudslava Esperanto-Servo en Zagreb. Majstre li tradukis kroatan la poemojn de Zamenhof.

Li estis longjara delegito de UEA en Mostar, kie li gvidis kelkajn kursojn de nia lingvo. Pacon al lia cindro!

Abontarifo.

Rumanujo.

La pliboniĝo de la rumana valuto ebligas al ni malaltigi la ponumeran prezon de ET.

Unu numero nun kostas nur 10 leojn.

Ni esperas, ke la prezoredukto alportos al ni novajn abonantajn kaj restigos fidelajn la malnovajn.

Korekto.

Post publikigo de la dekreto de la prusa ministro pro Scienco, Arto kaj Popolklerigado ni sciigis, ke la dekreto ne estas subskribita de l' ministro Boelitz mem, sed de komisiito Jahnke. Ni do petas tiusence ŝanĝi la subskribon.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberal vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas ĉi tiel la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

Malfermita letero.

Rilatas 258 kaj 260.

Traleinte la artikolon 258 de s-o Meazzini, ni komence ne volis esprimi publike nian indignon pri la lingvo uzata de s-o Meazzini, ĉar la rimarko de la redakcio, tre trafa, nin preskaŭ kontentigis. Sed nun, traleinte en la n-o 182 la artikolon 260 de la sama aŭtoro, ni sentas nin devigitaj protesti kontraŭ tiaj skribaĵoj. En la lasta artikolo (260) s-o Meazzini pruvus, ke li absolute ne komprenas, kio estas "Fundamento de Esperanto". — Lia frazo "Fundamento nun povas esti konsiderata nur historia dokumento" klare montras, ke s-o Meazzini malrespektas "Fundamenton". Li verŝajne forgesis, ke anoj de Lingva Komitato promesis fidelecon al "Fundam." — Do, se li ŝanĝis sian antaŭan opinion, li havu almenaŭ kuraĝon eksigi.

Revenante al 258 ni invitas ĉiun atente tralegi tiun mirindan verkon de Lingva-Komitato (n-o 179 de ET). Ni preterlasas la enhavon, ni speciale atentigas ĉiun al la terura stilo kaj lingvaj malbonaĵoj. Detalaj komentarioj estas superflujaj, sufiĉas konstati, ke en 32-linia artikolo de Lingva-Komitato troviĝas 15 malbonaĵoj (etimologiaj, sintaksaj kaj gramatikaj eraroj, necesej novaj vortoj, sirngaj frazkonstruoj).

Ni turnas nin al anoj de la Esp. Akademio kaj L. K. petante, ke ili aliĝu al nia protesto. Se s-o Meazzini ne volas eksigi el la L. K., li almenaŭ nenion presigu en esperantaj gazetoj, ĉar tiaj skribaĵoj povas konfuzi la ne sufiĉe spertajn esperantistojn kaj eĉ kompromiti la Lingvan Komitaton.

Skribinte tiun ĉi leteron, ni neatendite ricevis la numeron 1-2 (1924) de "Kosmoglot, organ de societé Kosmoglot et de académie pro interlingva" kaj ekvidis sur ĝia unua paĝo grandlitere skribitan nomon de s-o Meazzini, kiel "socios" de Académie. — Do, krom ĉio supredirita evidentiĝas, ke s-o Meazzini sidas sur du seĝoj. —

Kaunas (Litovujo), 19. III. 1924. Pr. A. Dombrovski, Akademiano. P. Medem, L. K.

Al la tutmonda esperantistaro.


La movado en Danujo ne estas tiel forta, kiel ni povus deziri. Pro propaganda celo oni en Odense deziras akiri objektojn por rondiranta ekspozicio, t. e. societoj en Danujo, dezirante aranĝi Esperanto-ekspozicio pro propagando, povos sekunde pruntepreni la objektojn de ni. Por realigi tion ni petas samideanojn, sendi donace al ni Esperanto-gazetojn, lernolibrojn de diversaj lingvoj, tabulojn, librojn ktp.

Ni esperas, ke la esperantistaro komprenos la signifon de la demando. Fortigu la movadon en la nordo! Kun danko la donacoj estis ricevataj de s-o Alfred Christensen, Kastanievej 32, Odense, Danujo.

Kuracistoj (TEKA-anoj).

Pro sukcesplena aranĝo de faka konferenco, vi estas petataj anonci vian viziton al la XVI-a kongreso, kiu la temon (ĉu sciencan, ĉu priorganizan), pri kiu vi volas paroli aŭ prelegi, ĝis plej malfrue la 15 junio al D-o Edmund Sós, TEKA-konsulo, ano de LKK, Wien I, Tuchlauben 18.

(Naciaj esp. gazetoj estas petataj represi ĉi tiun alvokon.)



Patent-vendo Licenca cedo por Jurko-masonaĵo

per nur unu ŝtono samtempe uzebila por interliga, kava kaj plena masonaĵoj, plej perfekta elfrovaĵo de la konstrutekniko, pli bona ol brikmasonaĵo, krom tio pli malkara je 40 ĝis 60%, por loĝejoj, industriaj, agrikulturaj kaj ĉiŝtupac konstruaĵoj, grava por fabriko de entreprenoj por konstruado kaj betonado, por gasfarejoj, elektrocentroj, fervojoj, industrioj kaj briklarejoj.

tuj vendebila.

R. O. Koppe, Leipzig, Breitenfelderstr. 71.

Advertisement for 'Ĵus aperis: Ŝolandro' by Waldemar Bonsels. It describes the book as a collection of fairy tales from the Netherlands, translated into Esperanto. The publisher is Paul Knepler, Wien I, Lichtensteg 1.

Se vi bezonas Esperantajojn

postulu la riĉenhavan katalogon de:
... niuj multe ŝatataj eldonaĵoj! ...
(Lerno- kaj ekzercolibro, vortaroj, literaturaĵoj verkoj ĉiŝtupacaj, insignoj, propagandiloj ktp.)
Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!
La plej malnova el ĉiuj ekz. Esp.-gazetoj.
Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.
Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanujo)

Advertisement for 'Membroj en pli ol 40 landoj' by Fr. Jakobi. It lists various countries where the publication is available, including Austria, Czech Republic, and others. The publisher is Fr. Jakobi, Coblenz, Germany.

Advertisement for 'Sagaj siniorinoj!' by Higierna entrepreno: W. Heilmann. It describes a business opportunity in Hamburg, involving the sale of household goods and services.

Anoncetoj.

- Atentu, se vi uzas rimedojn kontraŭ malhelpo en la instruado! ...
Savon kaj novan vivigojon alportas mial de Jardeko provita specialo, kiuj forigas malalmenajn ekhalojn, kiuj povas esti ...
Higierna entrepreno: W. Heilmann, Bellealliancestr. 46, Hamburg 19/947.
Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, flandiĝo, edziĝo, morto, okazontaĵo, gravaj esp. kunvenoj, festoj k. a.) senpage.
SENDU MODREVLIVON! Mi pagos akurate per novaj rusaj PM kaj mono. Adreso: S-ino Patolaj, Niŝegorodskaja str. N. 15, Piatigorsk (Kaŭkazio), Rusujo
21 JARA KOMERCISTO kun 1 jara bankpraktiko serĉas okupadon en komerco aŭ industrio en eksteraldo.
PETRO. Kiu nobelkorulo ebligas la muzikan perfektigon por du progresinta, talenta, sed malriĉa junulo (violono kaj harpo).
LA MALNOVA STUDANTA Esp. Societo decidis aranĝi kurson sub la gvidado de Lidia Prof. Siŝmanova.
KOLEGOJ PETROLMINISTOJ en Rusujo! Kiel vicestro de petrolmineja sekcio (ankaŭ administracio) mi volas translokiĝi Rusujon.
KIU POVAS respondi al ni numerojn elĉerpiĵajn de ET 180, 182, 184.
URĜAS! Serĉas siniorinojn ne germansciencintajn por samtempa kaj restado en belege loĝita alpa kuracejo cele de Esperanto-interparolado.
SERĈO. Mi petas bonvolajn informojn pri s-o Nikolaj J. Buzni, finita liceain studojn en 1918 en Simferopol (Rusujo).
ADRESA ŜANGŬO. Mi volas korespondadi kun tiunmondaj samideanoj per il. PK.
JUNA LABORISTO, 24 jara. Jam de longa tempo senlabora, serĉas kluĝan ajn laboron.
SUD-AMERIKANJO! Helpu pravi la helpemon de la samideanoj.
HELPU, SAMIDEANOJ! trovi mialn karajn amikojn ...

HELPU, SAMIDEANOJ! trovi mialn karajn amikojn Kalmán Szakaly kaj Andreo Sztarosta (hungaroj).
Korespondado kaj Interŝanĝo.

- Tri fratoj, Richard 25-jara, Alfred 21-jara kaj Erich Tautz 20-jara.
S-o Prof. Timirijazeva, Serebrenikovskaja ul., Zavedivajuĉemu ŝkolaj, Novonikolaevsk, Siberio, Rusujo, gelerinantoj de esperantaj kursoj deziras korespondi per L kaj il. PK kun ĉiuj landoj.
Libristoj! Mi serĉas korespondon kun fakuloj en landoj: angla, belga kaj franca.
S-o Herbert Beillich, Weissteinstr. 8, Nieder-Hermsdorf, Bez. Breslau, Schles., Germ., deziras korespondadi per il. PK kaj ankaŭ interŝanĝi paperojn kun ĉiuj landoj.
Mi deziras interŝanĝon de PM kun la tuta mondo.
S-o Josef Vizner, Kralupy n. Vlt. 285, Ĉeĥosl., deziras interŝanĝi PM kun la tuta mondo.
S-o V. Chmieleuskas, Technikumas 1. k., Dohnava, Litovio, deziras korespondadi per il. PK kaj l. kaj interŝanĝon de PM.
Filatelistoj! Mi proponas interŝanĝon de PM kun ĉiuj landoj.
S-o V. Prochazka, studento de Komerca Akademio en Beroun v. Č., Ĉeĥosl., deziras interŝanĝi PM kaj il. PK kun la tuta mondo.
Fraŭlo Karl Lamm, Markgrafenstr. 50 a, Karlsruhe i. B., Germ., deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj.
La Virina Esperanta Klubo, P. O. Box 225, City Hall Station, New York City, N. Y., U. S. A., deziras korespondi kun esperantistoj siniorinoj; per L.
Du germanaj studentoj deziras interŝanĝi PM, il. PK kaj korespondi kun gestudentoj en Francujo, precipe en Parizo, Belgujo kaj Nederlando.
S-o Rich. Hartmann, Hermsdorf, Kr. Waldenburg, Schles., Germanujo, deziras interŝanĝi il. PK l. kaj PM kun la tuta mondo.
S-o Fujita-Kuinosuke, Kizu Kamome-ĉo - 2 chome, Minami, Osaka, Japanujo, volas korespondi kun artistoj, penthistoj kaj skulptistoj, kaj interŝanĝi librojn, gazetojn kaj arto.
Du junaj amikoj, R. Greff, 28 rue des Brasse, Bischheim, A. Fillinger, 56 rue des Bouffes, Hoenheim, Bas-Rhin, Francujo, deziras korespondi per il. PK (bif.) kaj L kun la tuta mondo.
F-ino Cläre Booch, Schanzestr. 25, Dresden-N., Germanujo, deziras korespondadi kun la tuta mondo per il. PK kaj l.
Soc. Lab. junularo deziras korespondi per L kaj il. PK kun la tuta mondo.
17-jara fraŭlo deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo.
S-o Johano Ferras, Avenida Icaria, 187-2-2, Barcelono, Hispanujo, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj per il. PK kaj L.
Sekretario de Irkutska Gubernija Fako de S. E. U., k-do Babiĉev, A. A. Irkuiŝk, Zverevskaja str. 14, Siberio, Rusujo, 55-jara fraŭlo, proponas al samideanoj interŝanĝon per personaj fotografajoj, il. PK kaj L. Temoj laŭ placo.
S-o Josef Weiss, Waldenburg-Altwasser (Schles.), Breslaustr. 9, Germanujo, deziras interŝanĝi PK, L, ankaŭ PM kun ĉiuj landoj.
Dek kursoj deziras korespondi per L kaj il. PK kaj interŝanĝi esperantaĵojn kun ĉiuj landoj.
Kiu sendas al mi (kolektanto) ĝis 200 PM de sia lando, ricevos samvaloran sendaĵon da germanaj PM.
Deziras korespondi kun eksteraldoj, escepte Germanujo.
S-ino Leonine Bauer, linke Brückerstr. 4, s-ino Maria Haidinger, Ringstrasse 51, s-ino M. Oppermann, Keplerstrasse 26/2, F-ino Sieglinde Benedikt, Hofgasse 22, ĉiuj en Linz, Aŭstrio.
20-jara razisto deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo, prefere razistoj.
Kiu sendas al mi 50-100 PM de sia lando, krom Germanujo, ricevos saman kvanton de mia lando.
Mi deziras korespondi per L kaj il. PK.
Mi deziras korespondi kun Nederlando, Svisujo, Grekujo, Turkujo kaj Litovio.
Du novaj samideanoj gimnazianoj deziras interkorespondadi kun samideanoj de la tuta mondo.
S-o Alfred Liebig, Ober-Wüstegiersdorf (Schles.), Bahnhof, Germanujo, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj.
Deziras interŝanĝon de PM (bazo Michel-Ivert).
F-ino Gerda Jürgensen, Kjiellerup, Danujo, deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo.
S-o K. H. F. Hamelink, Parallelulo 157/2, Hago, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. PK kaj L.
F-ino Julia Klein, str. Universitāti 5, Cluj, Rumanujo, deziras interŝanĝi il. PK kaj L kun ĉiuj landoj.